



5(150)
2014

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas:

ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,

Adreso por korespondi:

str. Sokolska 13, 31-510 KRAKÓW

Danuta Perier-Berska

Daj ptakom nutki wiatru
by chwałę Twą śpiewały,
kwiatom barwy nieziemskie
by oczy zachwycały.
Skałom kamienne zdrowie
na wieki wieków trwanie,
a nerwom skołatanym
daj siłę na przetrwanie.
Tych co odchodzą pociesz
nadzieją zmartwychwstania.
I pozwól kochać Ciebie
mocą Twego kochania.

A kiedy ptak umilknie
i kwiaty barwę stracą,
kamień w pył się zamieni
i zdrowie się utraci –
niech się otworzy brama.
Szeroka niebios brama.
I przyjmą nas otwarte
ramiona Stwórcy – Pana.

Kiedyś

Przyjdzie czas
święty Piotr
kluczem zgrzytnie
wskaże kierunek
cienie tych co
przyszli przed nami
witać nas będą
światłem miłości
i nic nam nie będzie potrzebne
nic!

Donu notojn de l' vento
al bird-kantoj; al floroj
donu ravajn kolorojn,
ĉio por Via gloro;
al rokoj ŝtonan sanon
kaj daŭron tra miljaroj,
al febliĝintaj nervoj
esperon de riparo.
Tiujn, kiuj foriras
per resurekt' konsolu.
Kaj ami Vin per forto
de Via am' bonvolu.

Kaj kiam bird' ekmutos,
bunto de floroj pasos,
ŝton' ŝanĝiĝos en polvon
kaj sano vin forlasos –
malfermiĝu ĉiela
pordego kun favoro
kaj akceptu nin brakoj
apertaj de l' Sinjoro.

Iam

Venos momento
sankta Petro
per ŝlosilo grincos
montros la direkton
spuroj de tiu
kiuj alvenis antaŭ ni
nin bonvenigos
per lumo de l' amo
kaj nenion ni bezonos
nenion!

tradukis Lidia Ligeza

Kun granda malĝojo Krakova Societo ESPERANTO informas,
ke la 4-an de junio 2014 j. mortis subite nia 93-jaraĝa amikino
s.†m.

Jadwiga Czarnecka

naskita Szura

persono neordinara, esperantistino, konantino de multaj lingvoj,
muzik-ŝatantino, pian-ludantino, adeptino de la arta teksado kaj
ĝarden-kulturado, anino de E-Sekcio de KIK, E-Klubo Unesko,
E-Sekcio de Kooperativo „Społem“
kaj Krakova Societo ESPERANTO.

La funebra diservo kaj la entombigo okazis en Krakovo,
sur Rakowice-Tombejo 10. 06. 2014 j., je la 11:00 h.

Ĝeamikoj kaj samideanoj

La 4-an de junio, je la 5:00 h. forpasis subite nia kara anino kaj amikino **JADWIGA CZARNECKA**, plena de la vivforto ĝis la lasta momento.

Ŝi kun la familio, amikaro kaj anaro de KSE 21-an de februaro 2011 j. festis sian naŭdekan datrevenon de la naskiĝo. Ĉi-jare, februare ŝi havis jam 93 jarojn. Laŭfakte ŝi estis ekonomiistino laboranta laŭvice en kelkaj institucioj, antaŭ la emeritiĝo ŝi laboris en Buroo de Projektoj.

Januare en la jaro 1945 ŝi edziniĝis al Roman Czarnecki, kiun ŝi ekkonis en la komuna laborejo, Direkcio pri Fervojoj en Krakovo. Naskiĝis la infanoj Barbara kaj Janusz, kiuj post siaj nuptoj fariĝis la gepatroj de du nepinoj kaj du nepoj de Jadwiga. Ŝi ĝisatendis ankaŭ kvar pranepojn.

Ni senĉese ŝin estimis kaj amis pro la societaj avantaĝoj, vikleco, spritemo kaj multaj interesiĝoj. Ŝi estis eksterordinare bona babilantino, do interparolo kun ŝi ĉiukaze donis al ni veran plezuron. Babilante kun ŝi ni ankaŭ havis okazon ekkoni aferojn kaj rememorojn, ofte tre gravajn, pri kiuj neniu alia scipovus nin informi.

Kiam ŝi loĝis ĉe strato Brogi, nerare ŝi invitadis nin al sia zorgeme flegata ĝardeno kaj regalis per bongustaj frandaĵoj kaj ĉarma konversacio.

En la jaro 1976 al kono de kelkaj fremdaj lingvoj ŝi kun granda ĝojo aldonis ankoraŭ unu – Esperanton, al kiu ŝi restis fidela ĝis la lasta momento. Grava por tiu decido estis fakto, ke kaj la bopatro kaj la edzo estis esperantistoj. Ŝi vikle partoprenis en nia lasta, tuje finita aranĝo, XXVIII-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo (30.05 -1.06.2014), simile kiel en la tuta esperantista vivo. Kelkfoje ŝi estis anino de Estraro de PEA kaj KSE, ankaŭ ŝi partoprenis en kunvenoj de KIK.

Konante Esperanton ŝi pli ol dudekfoje vizitis Anglion, Francion, Belgion, Hungarion, Litovion, Nederlandon kaj Svislandon. Pri siaj riĉenhavaj vojaĝimpresoj ŝi ofte rakontadis dum klubejaj renkontoj. Ŝi partoprenis multfoje en esperantaj kongresoj landaj kaj eksterlandaj, ekz. en 72-a UK-o en Varsovio – 1987, en 84-a UK-o en Berlino – 1999, en 30-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso en Krakovo – 2000, k.a.

Ankaŭ dum ili ŝi havis okazon prezenti siajn pormuzikajn interesiĝojn ludante pianon. Ŝi ankaŭ arte teksis laŭ kelkaj sistemoj. Ni ekzemple bone memoras belan ekspozicion de ŝiaj teksaĵoj aranĝitan en Kulturdomo „Podgórze” okaze de 100-jariĝo de KSE, en la jaro 2006.

Precipan nian admiron igis ŝia pollingva memorlibro „Śladem pokoleń”, kiu aperis en la jaro 2011. Ĉi neordinara verko priskribas ĉiujn momentojn, kiuj estis por ŝia vivo gravaj, ne forgesante pri la esperanta agado. La unua versio de memorlibro estis skribita esperantlingve, sed la aŭtorino decidis, ke la teksto antaŭ ĉio devas esti memoraĵo por la familio, do helpe de Janina Rżany kaj aliaj klubaninoj ekestis la teksto pola tradukita el Esperanto. En la sama jaro, junio, okazis promocio de la



libro, kiu elvokis grandegan interesiĝon. Multnombre amasigita en fama salono de Fontana (Klubejo de Ĵurnalistoj „Sub Piro”) publiko demandis la aŭtorinon pri la priskribitaj okazintaĵoj kaj ilia etoso. La aŭskultantoj kompletigis informojn de Ina aldonante proprajn rememorojn.

Ŝi forpasis subite. Malgraŭ ŝia grava aĝo oni ne povas je tio ekkredi, ĉar en nia klubeja vivo ŝi estis ege pitoreska persono, kiu vere mankos.

Ni sincere kondolencas al la tuta familio, por kiu la morto de Jadwiga estas grandega perdo. Por ni, ĉiuj esperantistoj tiu perdo estas la same granda.

Ni rememoros ŝin kun granda bedaŭro, favoro kaj amikeco. Ŝi restos por ĉiam en nia elkora memoro.

Amikoj de Krakova Societo ESPERANTO

Jadwiga „Ina” Czarnecka

Mia Esperanto

Mia aventuro kun lingvo Esperanto komenciĝis en 1976 jaro. Mia edzo Roman finis la kurson de Esperanto en 1933 j., en Jagelona Universitato, inspirita de sia patro. Mi rigardis memorfoton de tiu kurso, sur kiu sinjorino Zuzanna Ĉwiklińska troviĝas en la centro kaj mia estonta edzo, juna abituriento, staras en la supra vico.

Delonge mi deziris ekposedi tiun lingvon. Havante en la familio esperantistojn kaj lerno-librojn neunufoje mi trarigardis esperantajn publikaĵojn de mia bopatro, eĉ tiuj de 1910 j. Mi atendis la ĝustan liberan tempon. Finfine mi povis parte rezigni de la familiaj devoj. La infanoj fondis proprajn familiojn, tage mi fake laboris kaj vespere mi partoprenis en Esperanto-kursoj. Mi englutis tiun hoketon por ĉiam.

De pli ol 10 jarojn Krakova Societo Esperanto, kies anino mi estas, havas sian sidejon en Kulturdomo „Podgórze” laŭ la konsento de favora al ni direktorino Marta Perucka-Tytko. Unufoje semajne okazadas tie renkontoj ĉe teo kaj esperanta konversacio. Ankaŭ oni aldiras referaĵojn kaj prelegojn en Esperanto pri kulturaj, lingvaj kaj sociaj temoj. Poste ni utiligas diversajn programejojn de la Kulturdomo.

En Esperantaj Tagoj de Krakovo pli frue organizitaj decembre, nun ni partoprenas komence de junio, ĉar tiam oni en la jaro 1906 fondis KSE-on. La aranĝo gastigas multajn gesamideanojn ankaŭ ekster Krakovo. Oni proponas prelegojn de la anoj, artistajn elpaŝojn kaj ekskursojn tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Ofte elpaŝas esperantaj agantoj, i.a. tradukanto kaj redaktoro Tomasz Chmielik de Świdnik kaj redaktoro Kazimierz Leja, esperanta eldonisto de Czeladź, ano de nia Societo. Kadre de la muzikaj programoj elpaŝadis kapablaj gefratoj Julia kaj Joachim Kołpanowicz plenumantaj la seriozan muzikon. Ŝi estas violonistino, li ludas pianon kaj klasikan gitaron. Grandan interesiĝon elvokadis spektaklojn kaj recitaĵojn de du profesiaj aktorinoj Jadwiga Gibczyńska kaj Anna Ramza, kiuj esperantlingve prezentis klasikan aŭ nuntempan repertuaron.

Ni precipe ĝojas de partopreno de simpatiuloj, ĉar ĉi tio formas specifan promocion de Esperanto. Inter eksterkrakovaj gastoj estas merita esperantisto. Inĝ. Bohdan Wasilewski de Pola Esperanto-Asocio en Varsovio. Li estas prezidanto de la Seniora Sekcio en Pollando. Dum Krakovaj Tagoj mi ricevis de liaj manoj Distingilon de Senioro, kiel la aktiva anino de PEA.

La esperantaj organizaĵoj aranĝas por la membroj ekskursojn kaj feriadojn. De 1976 jaro en multaj el ili mi partoprenis.

Dum sesdekaj kaj sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento la Vroclava Filio de PEA organizis popularan esperantan feriadon „La Ora Pola Aŭtuno” en Międzygórze. Partoprenis en ĝi esperantistoj de dekelkaj landoj en nekredbla nun nombro 500 personojn. Riĉa, tuttaga programo antaŭvidis ekskursojn tra la ĉirkaŭaĵo, diversgradajn kursojn de la lingvo kaj vesperajn, kulturajn aŭ distrajn aranĝojn (ekz. esperantan teatron). Ĉiuj zorgeme pretigadis sin al ĉiujara Balo de Ĉifonuloj, ĉar sen la kostumo ne eblis eniri salonon de pensio „Gigant”. La plej spritaj aŭ plej belaj kostu-

moj estis premiitaj, ne nur per aplaŭdo, en ĵurio eksidadis kutime la krakova aktorino Jadwiga Gibczyńska.

En naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento Andrzej Kołpanowicz, agnoskita krakova esperantisto organizis ekskursojn al ĉebaltaj landoj, al Litovio, Latvio kaj Estonio. En 1997 j. ni ĝisveturis per trajne al Bialistoko, kaj poste per aŭtoĉaro al Litovio. Rivero Neman fluanta en la natura riverujo ravigis nin per la primara belo, meandroj kaj elkovejoj de birdoj. Ni ankaŭ vizitis Monton de Krucoj kun neordinara vizaĝo de miloj da krucoj sur monteto – loko de pilgrimadoj kaj religiaj solenaĵoj, unu el la plej grandaj atrakcioj turismaj de Litovio.

El esperantligvaj notaĵoj al libro „Śladem pokoleń. Pamiętnik”

Franz Kafka

Eta fablo

„Aĥiĥ”, diris muso. „La mondo estas tagon post tago pli streta. Komence ĝi estis larĝa tiom, ke mi la vaston eĉ timis. Mi do kuris plu kaj mi estis feliĉa, poste en la fono mi ekvidis murojn, dekstre kaj ankaŭ maldekstre. Sed nun la longaj muroj tiel rapide konverĝas, ke mi jam estas en la lasta ĉelo kaj tie, en la angulo, embuskas kaptilo, en kiun mi nun kuras”.

„Ne gravas, ŝanĝu nur la direkton de via kuro”, diris kato kaj formangis ĝin.

tradukis *Jan Werner*

Vazo kaj ŝtonoj

Foje instruisto pri filozofio venis en klason kaj sian lecionon prezentis pli eksperimente ol parole. El tirkesto li elprenis vazon kaj plenigis ĝin ĝis la rando per ŝtonoj. Poste li demandis la studentojn, ĉu laŭ ilia opinio la vazo estas plena. Ili respondis jese. Sekve la instruisto prenis skatolon kun ŝtonetoj kaj ŝutis ilin en la saman vazon, samtempe ĝin iom skuante. La ŝtonetoj faladis inter la ŝtonojn. La instruisto denove demandis: „Ĉu la vazo estas nun plena?” la studentoj ridetante, denove respondis jese. Poste la instruisto prenis skatoleton kun sablo kaj ŝutis ĝin en la vazon. La sablo plenigis ĉiujn spacojn inter la ŝtonoj kaj ŝtonetoj. Nun la vazo estis vere plena.

La instruisto diris al la studentoj: „Per tiu ĉi eksperimento mi volis montri, ke ĉies vivo estas kiel tiu ĉi vazo. Ŝtonoj estas kiel gravaj aferoj en via vivo: via familio, partnero, sano, infanoj. Ŝtonetoj prezentas aferojn malpli gravajn, ekzemple vian okupon, domon, aŭtomobilon. Kaj sablo estas ĉio cetera, bagatelaĵoj. Se vi en la vazon enmetas unue sablon, jam ne restas loko por la ŝtonoj. La samo validas pri la vivo. Se vi malŝparas tempon kaj energion pro bagatelaĵoj, ekzemple pro materiaj aferoj, neniam vi havos tempon por aferoj, kiuj estas vere gravaj. Dediĉu vian zorgon al la aferoj por via vivo decidaj. Ludu kun viaj infanoj, invitu vian partneron danci. Ĉiam restos al vi tempo por labori, purigi la hejmon, kuiri la manĝon, fari aĉeton. Bone zorgu pri la ŝtonoj. Konscie fiksu viajn celojn. Ĉio cetera estas nur ŝtonetoj kaj sablo. Abundan feliĉon. Mi esperas, ke vi sukcesos”.

Viaj manoj ĉiam havu ion por labori, en via monujo ĉiam estu iomo, la suno ĉiam prilumu vian fenestron, post ĉiu pluvo sekvu ĉielarko, en via proksimo ĉiam estu iu amiko, Dio plenigadu vian koron per feliĉo.

Aŭtoro nekonata; tradukis *Jan Werner*